


PROJEKTO “VEK” (Virtuala Esperanta Katalogo)

Ana Manero García
18-8-2018


Enkonduko: kial “virtuala” katalogo

La kreado de komuna katalogo postulas grandan laboron de kunordigo, kiun la prizorgantoj de Esperanto-bibliotekoj malfacile povus atingi pro la diverseco de bezonoj kaj ebloj de ĉiu el ili. Kaj kvankam ĝi havas certajn avantaĝojn, ĝiaj malavantaĝoj estas tre malfacile supereblaj.




Avantaĝoj	Malavantaĝoj
Kundivido de datenoj.	Malfacilo labori kunordige ĉar ĉiu biblioteko havas malsamajn bezonojn kaj eblojn.
Nur unu instalaĵo de la biblioteka programo.	Por bibliotekoj starigitaj malfacilas adaptiĝi al la komunaj postuloj.
Sekurkopioj estas komunaj.	Por bibliotekoj ankoraŭ ne starigitaj malfacilas labori laŭ la labormetodoj de tiuj jam funkciantaj.
	Kaze de paneo de la servilo, estas pli granda risko perdi la komunan datenaron.
	Bezonatas prizorganto(j) de la komunaĵo.

Eblus rezigni je kunordigado sed tiel, kvankam la datenbanko estus komuna, la rezulto tute ne estos katalogo el bibliotekista vidpunto. Malperas kelkaj malavantaĝoj, tamen la rezulto ne estos kontentiga.



Avantaĝoj	Malavantaĝoj
Kundivido de datenoj.	Malfacilo labori kunordige ĉar ĉiu biblioteko havas malsamajn bezonojn kaj eblojn
Nur unu instalaĵo de la biblioteka programo.	Por bibliotekoj starigitaj malfacilas adaptiĝi al la komunaj postuloj.
Sekurkopioj estas komunaj.	Por bibliotekoj ankoraŭ ne starigitaj malfacilas labori laŭ la labormetodoj de tiuj jam funkciantaj.
	Kaze de paneo de la servilo, estas pli granda risko perdi la komunan datenaron.
	Bezonatas prizorganto(j) de la komunaĵo.
	La rezulto ne estos vera katalogo, sed iaspeca inventaro de bibliotekaj havaĵoj.

Estas tria ebleco considerinda: la kreado de “virtuala” katalogo surbaze de komuna serĉilo profitante la fakton, ke per taŭga biblioteka programo (el la senpagaj, Koha montriĝas la plej taŭga) ĉiuj bibliotekoj povos esti ligitaj “malantaŭe” per Z39.50 kaj interŝanĝi rikordojn por tiel faciligi la katalogadon. La esploristoj povos, siaflanke, serĉi samtempe en unu, pluraj aŭ ĉiuj bibliotekoj aligitaj al la projekto pere de tiu metaserĉilo.



Avantaĝoj	Malavantaĝoj
Kundivido de datenoj per Z39.50 por kataloga laboro.	Ĉiu biblioteko aŭ grupo de bibliotekoj devus havi sian propran instalitaĵon.
Ne necesos interkonsento pri normoj, regularoj aŭ labormetodoj. Ĉiu biblioteko aŭ grupo de bibliotekoj povos plu uzi tiujn jam uzatajn laŭkutime kaj tio ne kaŭzos problemojn pri kohereco ĉar fakte ne ekzistas komuna datenbanko.	Ĉiu biblioteko devus zorgi pri siaj propraj sekurkopioj.
La katalogo de ĉiu biblioteko estos mem kohera.	Oni devas krei programon por la virtuala serĉilo.
Eventuala paneo de iu servilo, ne okazigos problemojn al la ceteraj bibliotekoj.	
La “komuna katalogo” estos virtuala, kaj ĝi kreiĝos ĉiufoje kiel rezulto de serĉado per la komuna serĉilo.	

Ĉiu aparta biblioteko povus pli facile kunlabori kun lokaj ne esperantaj institucio.

Ĉio estos multe pli fleksebla.

Ĉar ĉio estos multe pli fleksebla, verŝajne tiel eblus krei komunan katalogon de Esperanto-bibliotekoj, eĉ se nur virtuala.

Cetere, eble ĉi-maniere, ankaŭ la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko povos ankaŭ partopreni la projekton. Kaj tiu virtuala katalogo permesos ankaŭ allasi aliajn bibliotekojn ne nepre esperantaj sed interesaj el la vidpunkto de ties esperantaj dokumentoj.

Virtuala Esperanta Katalogo

<input type="checkbox"/> Titolo	<input type="checkbox"/> Jaro
<input type="checkbox"/> Aŭtoro	<input type="checkbox"/> ISBN
<input type="checkbox"/> Korporacio	<input type="checkbox"/> ISSN
<input type="checkbox"/> Temo	<input type="checkbox"/> Eldoninto

<input type="checkbox"/> Biblioteko A	<input type="checkbox"/> Biblioteko C
<input type="checkbox"/> Biblioteko B	<input type="checkbox"/> Aŭstria Nacia Biblioteko
<input type="checkbox"/> Biblioteko A	<input type="checkbox"/> Worldcat

Subtenata kaj prizorgata de E@ISub la aŭspicioj de UEA kaj ESF